A-PDF Merger DEMO : Purchase from www.A-PDF.com to remove the watermark

# STARTO

## N-ro 2/2011 (239)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Fringoj 2011

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea@esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@seznam. cz

**Libroservo:** p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova @centrum.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

195 230 825 / 0300

**Poštovní spořitelna Poděbrady**

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidantino:** Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@ seznam.cz (reprezentado de ĈEA, kunordigado, internaj asociaj rilatoj, metodiko)

**Vicprezidanto**: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz (internaciaj rilatoj, fakaj aplikoj de Esperanto, ĈEA-retkomunikoj, eldona agado)

**Vicprezidanto:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, Tomecek@esperanto.cz (muzeo, konferencoj, TTT, ekster-asociaj rilatoj)

**Sekretario**: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz (protokolado, korespondado, rilatoj kun la banko)

**Kasistino (komitatano A de UEA):** Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz, (membrobazo, kontado)

**Komitatanino:** Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavladvorakova@tiscali.cz (kluboj, projektoj)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 530 319 263, malovec @volny.cz (sekcioj, komisionoj, lingvaj konsultoj, ciferecigado)

**Ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio kaj UK-perantino:** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828, Lucie.Karesova@seznam.cz

**Kontrolgrupo de ĈEA:**

*Prezidantino*: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 461 532 257, dvor.libuse@seznam.cz

Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 332 339, vhirsx@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 00 Pardubice, Ludmila.Srbova@seznam.cz

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Čuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

**Kontrollegis:** Sabine Hauge, Pavel Polnický, Vratislav Hirš.

# La 63-a IFEF-kongreso en Liberec
# Centro Babylon 7.-14.5.2011




*Prezidanto de LKK Ladislav Kovář salutas la partoprenantojn kaj gastojn de la kongreso, kiuj alveturis en Liberec el 18 eŭropaj landoj.*

La fervojista kongreso daŭris unu semajnon kaj partoprenis ĝin 175 personoj el 18 landoj. Centro Babylon estiĝis el iama fabriko kaj estas nun komplekso, kiu konsistas el hotelo, konferencaj salonoj, multaj restoracioj, akvoparko, amuzejo por ekzerci sian inteligenton kaj diversaj vendejoj.

La solenan inaŭguron komencis infana dancgrupo per pluraj folkloraj dancoj kaj kantoj ĉeĥlingvaj (nur la lasta saluto estis „ĝis revido“). Poste alparolis la ĉeestantojn LKK-prezidanto L. Kovář, kiu prezentis personojn ĉe la podia tablo, nome: s-ro Gerhard Walter, urbestro de Esperanto-urbo Herzberg am Harz, s-ro Petr Pecháček, direktoro de la hotelo Babylon, s-ino Rodica Todor, prezidantino de IFEF, s-ino Sylviane Lafargue, vicprezidantino de IFEF, s-ro Guy Gieres, ĝenerala prezidanto de FISAIC, s-ro Jan Čermák, direktoro de fako de Ĉeĥaj Fervojoj, s-ino Libuše Hýblová, reprezentantino de UEA kaj ĈEA, kaj s-ro Vito Tornillo, sekretario de IFEF.

Post iliaj salutaj alparoloj venis reprezentantoj de unuopaj landoj por deziri al la kongreso sukceson kaj fine s-ro Jindřich Tomíšek ankoraŭ laŭtlegis mesaĝojn, kiuj venis poŝte (de Probal Dasgupta, de s-ro Wallerand el Francio, de honora IFEF-membro el Hungario s-ro János Patay, de Albanio, Ĉinio, Vatikano kaj tre kortuŝa de damaĝita Japanio).

Prezidantino de IFEF Rodica Todor laŭdis la ĉeĥan E-movadon, rememoris forpasintajn ĉeĥajn IFEF-anojn kaj transdonis honorigojn al Anna Abelovská, Ladislav Kovář kaj Jindřich Tomíšek pro ilia meritplena laboro por IFEF. Oni ne povis ne mencii sponsorojn (ČD, a.s., Starmon s.r.o., AŽD Praha s.r.o., geedzoj Kukla, Landa asocio de FISAIC ČD).

Dum la kongreso okazis kvar fakaj kunvenoj, precipe pri terminologiaj problemoj, tri duontagaj ekskursoj (tra Liberec, al la botanika ĝardeno kaj zoo aŭ al viadukto Novina kaj Ještěd) kaj unu tuttaga ekskurso (al Prago aŭ al kasteloj Hrubý Rohozec kaj Sychrov).

Lunde la kongresanoj povis reciproke interkonatiĝi dum granda internacia balo kun tombolo kaj riĉa bankedo.

Ne mankis ankaŭ libroservo, poŝtaj servoj kun kongresa stampo kaj eĉ amatora radiostacio por scivolemuloj.

Post la solena inaŭguro okazis ankaŭ ekumena diservo en preĝejo de Sankta Antonio.

**Koncerto de kanthoro Bendl**





Lokan kulturon reprezentis kanthoro Bendl kaj tri ensembloj de elementa art-lernejo ZUŠ Liberec: simfonia orkestro, sakfajfila muzikgrupo Dudáček kaj ĵaz-orkestro Big Band. La adoleskantaj muzikistoj prezentis ekz. simfonion komponitan de 15-jara Felix Mendels-sohn-Bartholdy, rememorigis melodiojn de ABBA, kantis folklorajn kantojn kaj montris, per kiuj ĵazaj melodioj ili iĝis absoluta venkinto de tutŝtata konkurso. La esperantlingvan muzikon reprezentis temperamenta franca kantisto JoMo (Jean-Marc Leclercq). La ĉambrojn oni nomis laŭ famaj ĉeĥaj pentristoj Mikoláš Aleš, Alfons Mucha, Emil Filla kaj Jan Zrzavý.



*A*ŭskultantaj kongresanoj


Dum la solena fermo estis transdonita kongresa flago al s-ro Achim Meinel, ĉar la venonta 64-a IFEF-kongreso okazos en la germana Herzberg am Harz, konata kiel Esperanto-urbo. Trideko da help-antoj, kiuj preparis la kongreson ricevis donaceton.



*En la Praga restoracio Výtopna malgrandaj vagonaroj distribuis trinkaĵojn.*

Necesas diri, ke la motoro de la kongreso estis d-ino Anna Abelovská, kiu zorgis, ke ĉio funkciu, kiel necesas. Tra Liberec ĉiĉeronis Milan Kazdera, tra Prago Petr Chrdle, al Ještěd Ladislav Hakl. Libroservon gvidis Andrea Hasala, financojn Věra Špínová, la Kongresan Bultenon teknike prilaboris Vít Stanov-ský kun Jaroslav Matuška, ofte tra la tuta nokto. Kunvenojn gvidis Ladislav Kovář kun Jindřich Tomíšek. La laboro de aliaj laborantoj kaj helpantoj ne estis tiel videbla, sed sen ili la aranĝo, kiun oni preparis tri jarojn, ne povus realiĝi.

*Miroslav Malovec*



# Esperanto en Brno festis 110 jarojn

La 21-an de majo 2011 esperantistoj en Brno festis 110 jarojn de la „Unua Societo de Esperantistoj Aŭstriaj en Brno“. Ĝi ricevis oficialan aprobon la 27-an de oktobro 1901, sed ĝuste la 21-an de majo samjare deputito Josef Hybeš interpelaciis en la aŭstria parlamento pro tio, ke la ŝtata burokrataro obstaklas la fondon de la societo kaj ĉikanas siajn civitanojn.

La soleno okazis en salono de Civitana Klubo, Hybeš-strato 65a, kaj partoprenis en ĝi 51 personoj, inter ili ankaŭ el Aŭstrio, nome Hans Michael Maitzen (honora prezidanto de AEF), Leopold Patek (estrarano de AEF), Elisabeth Hlauschek, Ion Ardelean, Evgeni Georgiev, Georgo Dermatis, Uwe Stecher (estrarano de AEF). Ili transdonis saluton de Bernhard Tuider, la nuntempa prezidanto de AEF, laboranto en la Esperanto-Muzeo.



El aliaj ĉeĥaj kluboj venis Miroslav Smyčka el České Budějovice, Jiří Patera kaj Jiří Souček el Prago, Libuše Filipová el Chropyně, Kamila Bártlová el Okříšky, Jaroslav Liška el Prostějov, Bohumil Boban Řepa el Netolice, Jan Bartušek el Olomouc, Anna Dzuňová kaj Alžběta Matějíčková el Přerov, Jarmila Čejková kaj Milan Neuvirt el EK Vítkovice. Pluraj kluboj kaj unuopuloj sendis siajn salutojn rete aŭ poŝte.

Speciala gasto estis operkantistino Helena Halířová, kiu preparadis por la klubo koncertojn ekde 1958. Ankaŭ nun ŝi proponis, ke ŝi venos koncerti kun trideko de siaj studentoj.

La programon komencis rememoro pri forpasintoj dum la lasta jardeko kaj himno *La Espero*, poste Miroslav Smyčka kantis kelkajn kantojn sen muzika akompano. La kluba prezidanto Miroslav Malovec koncize priskribis la historion de la klubo kaj la honora prezidanto Zdeněk Hršel alparolis la aŭskultantojn per kelkaj vortoj. Miroslav Hruška prezentis la agadon de nia junularo projekciante bildojn sur la muron. Post tagmanĝo en proksima restoracio Omega daŭrigis la programon Miroslav Malovec per rememoro pri forpasintaj gravuloj de la klubo. Věra Podhradská priskribis la kulturajn programojn postmilitajn (teatraĵojn kaj koncertojn), Pavel Lehký projekciis bildojn kun pruvoj, ke sen komuna facila lingvo EU ne povas konkurenci al Usono kaj Ĉinio kaj la prelegan posttagmezon finis Jan Werner per rememoro pri kvar epizodoj el la kluba vivo.

Bohumila Trzosová zorgis pri Libroservo kaj Oldřich Arnošt Fischer preparis malgrandan ekspozicion. Josef Vojáček presis broŝuron kaj prizorgis projekciilon, Zdeněk Závodný alportis donaceton al ĉiu partoprenanto preparitan de lia edzino kaj kun B. Trzosová aranĝis jubilean bildkarton. Slavomír Barták kun O. A. Fischer simile havigis jubileajn glumarkojn. Kelkaj klubaninoj servis per kafo, limonado kaj kukoj. La solenon gvidis kaj reĝisoris Věra Podhradská.

*-mm-*

# Raportaĵo pri semajnfina renkontiĝo de ĈeSKEJ en Plevník en Slovakio

Kies renkontiĝo? Ĉu vi diris vere ĈeSKEJ? Tio sonas mojose!* Sed daŭre mi ne scias, pri kio temas. Do, dum 2009 aŭtune oni kreis neformalan organizon ĈeSKEJ, kiu, kiel jam diretas la nomo, konektas du memstarajn organizojn, nome Ĉeĥan Esperanto-Junularon (ĈEJ) kaj Slovakian Esperantan Junularon (SKEJ). Estas fakto kaj vero, ke tiuj ĉi organizoj verŝajne neniam iĝos unu organizo en baldaŭa tempo, sed kial ne fari kun fratoj slovakoj (do bone, ni estu ĝentilaj, do ankaŭ kun fratinoj slovakinoj) almenaŭ iun semajnfinan renkontiĝon, kiu estus samtempe renkontiĝo por novuloj enkadre de ĈEJ. Kaj ĝuste tiu ĉi renkontiĝo en Plevník-Drienove estis ankaŭ renkontiĝo por novuloj. Ĝi okazis de la 15-a aprilo ĝis la 17-a aprilo 2011. Kiel kutime mi pakis ĉion nur kelkajn horojn antaŭ forveturo, sed fine mi povis diri al mi dum entrajniĝo en Brno: ĉio en ordo, ni eku! Mia vojaĝo unue ne gvidis direkte al Slovakio, sed al Hanakio. Do, al belega urbo Olomouc, kie mi proksimume unu horon atendis ĝis momento, kiam alvenis eksprestrajno de Prago, en kiu jam vojaĝis Bára, Lenka, Standa kaj Vít. La unuajn tri menciitajn personojn mi facile trovis en antaŭlasta vagono, Vít sidis sola en alia vagono. Tuj estis pli amuza vojaĝo al Považská Bystrica. Tamen mi forlasis por momento miajn kunvojaĝantojn kaj iris kun portebla komputilo saluti Vít kaj finfari iun prezentadon por lundo.

Je la oka horo vespere ni alvenis en Považská Bystrica kaj rilate al tio, ke restis ankoraŭ 40 minutoj antaŭ forveturo de pasaĝertrajno al Plevník, ni almenaŭ iris iomete rigardi urbon. Sed krom la lumigita aŭtoŝosea ponto ni vidis nenion interesan. Post reveno al la stacio ni aĉetis biletojn por la trajno. Al Plevník kun ni vojaĝis ankaŭ Rasťo Šarišský. Antaŭtimoj, ke ni devos serĉi la domon, kie okazos la renkontiĝo, estas for en momento, kiam ni eltrajniĝas kaj venas nin saluti Indré, Lubo Fajth kaj Juraj. Post 15 minutoj ni venis al domo numero 105, kie estas arkivo de SKEF kaj jam estas ĉi tie Katjo, Peter Novotníček kaj Peter Baláž. La unuan vesperon ni ankoraŭ ne laboris en la arkivo, ni nur iomete manĝis kaj decidiĝis, kie kiu dormos. Je la kvina horo venos grupo de tri homoj el Pollando, mi mem ofertas, ke mi iros al la stacidomo por ili. Ankaŭ ekhejti fornon kaj ekdormi!

Mia vekilo en poŝtelefono kaj vekilo en la kapo vekas min frue matene – je la kvara horo kaj duono kaj mi volas iri al la stacidomo por bonvenigi polojn. Sed ilia trajno estis malfruiĝinta kaj ili sendis al mi mesaĝon, ke ili venos je la sesa horo. Kaj en somoso estas anstataŭ tri subskriboj kvin subskriboj. Mi ete timas, ĉu ni ĉiuj havos lokon, sed esperebele supre estos sufiĉe da loko.

* *mojosa* = ***mo**dern-**jo**-**s**tila*

Do, je la sesa mi iras al la stacidomo. Ni salutas nin kaj revenas kompreneble al la arkivo.

Ĉirkaŭ la oka ni trankvile vekiĝas kaj preparas matenmanĝon. Dum poloj ankoraŭ dormas, ni jam eklaboras, ĉar estis multaj farindaĵoj. Kiu volis, povis dehaki lignon, aliaj povis klasifiki dokumentojn kaj librojn. Plej multe da laboro estis supre subtegmente, kie ni klasifikis fakan literaturon laŭ aboco. Ni malkovris iam vere interesajn verkojn. Oftaj estis diversaj manifestoj, tradukoj de Gorbaĉev, listo de seksaj pozicioj aŭ verkoj, kiel zorgi pri abelkestoj.

Dum tago alvenadas pliaj partoprenantoj kaj posttagmeze ni ekas promeni al *Manínská tiesňava* (valo inter rokoj). Inter partoprenantoj de la promeno estis ankaŭ danke al komuna lingvo Esperanto kamaradeca atmosfero kaj ni baldaŭ ekamikiĝis kaj pridiskutis multajn temojn, inkluzive langrompilojn, Esperantan agadon ktp. De la promeno ni revenis agrable malsatigitaj, jam estis tempo por malfrua tagmanĝo.

Dum posttagmezo ni faris ankaŭ komunan foton de ĉiuj partoprenatoj, bedaŭrinde en tiu momento estis for niaj geamikoj el Pollando. Ni ankaŭ faris enskribojn en kroniko. Sume 21 partoprenantojn mi taksas kiel tre favoran nombron.

Vespere, kiam ni jam ne volis tiom labori (ŝajne inspiris nin aŭto de Petro Baláž, kiu komence ne volis starti), ni iris ĉiuj el la arkivo al unu el lokaj restoracioj. Favorajn prezojn uzis ĉiu laŭ propra volo, iu krom biero aŭ limonado havis panon kun panŝmiraĵo aŭ parfeon. Grupeto el Pollando ja foriras dormi pli frue, ili volas dimanĉe forveturi je la kvina horo al Ĉeĥio kaj dum vojo ankoraŭ rigardi la urbon Ostrava.

Resto de ni babilas pli longe kaj post reveno al la arkivo ni daŭrigas en bonhumora babilado.

Dimanĉo estis ĉefe pri forveturado hejmen. Je la kvina horo forveturas do pola grupo, je la sepa poste grupo al Prago. Ni pakas, matenmanĝas kaj finas laboron supre en la arkivo.

Kune kun Juraj, KuboF kaj Ŝeby ni finfine forveturas je la unua horo al Považská Bystrica, kie ni adiaŭas kun Juraj, kiu vojaĝas al Bratislava, resto de ni al Ĉeĥio. Ankoraŭ aĉeti transliman bileton, foti slovakan version de CityElefant (en Ĉeĥio jam tipa duetaĝa pasaĝertrajno) kaj ek al Ĉeĥio! Fine, ni adiaŭis jam en Horní Lideč, kie mi kun KuboF eltrajniĝis kaj aĉetis grupan bileton al Brno. Vojaĝo per persona trajno al Hranice na Moravě estis sen malfruiĝo kaj ni pridiskutis jam tradicie pliajn temojn (ĉefe komputilojn kaj operaciajn sistemojn). En Hranice estis trajnŝanĝo al rapidtrajno al Brno.

Vespere je la sesa horo ni estas en Brno kaj ni adiaŭas (sed ne por longa tempo, merkrede mi denove renkontiĝas kun KuboF dum prelego).

Spertoj? Nur pozitivaj. Mi havas nur plendon pri iomete fuŝa antaŭorganizo, sed fine ĉio estis en ordo.

*-miropiro-*

# Ĉeĥa Konferenco, 3-a jaro



De la 13-a ĝis la 15-a de majo 2011 en Kutná Hora okazis jam la tria Ĉeĥa Konferenco. Pro eta spaco en la monaĥinejo de Ursulaninoj la nombro de partoprenantoj estis ĉi-jare limigita al maksimume 100 personoj.

Ĉeĥa Konferenco dekomence taskas al si trovi ĝustajn vojojn por plibonigi nian socion.

La unuaj du konferencoj nur registris la staton de la socio kaj ĝiajn negativajn aspektojn. La tria konferenco celis trovi novajn vojojn laŭ slogano Kiavoje kaj kiamaniere?

La prelegoj estis koncentritaj al tri ĉefaj blokoj:

- Politika-ekonomia
- Evoluigado de la socio per kooperativoj
- Klerigado kaj edukado de infanoj

Plie pluraj prelegoj havis diversajn spiritajn, eĉ religiajn temojn.

En la unua bloko mi havis enkondukan prelegon Kiel korekti la demokration (Pri tio ni povus debati en la klubo, se estos intereso).

Sekvis prelego de Ing. Schlimbach pri funkciado de la ekonomio kaj komerco en socio sen mono.

Fondinto de la portalo Pozitiva Mondo, sinjoro Havlíček, ne venis pro malsaniĝo. Interesajn artikolojn, kiuj informas pri la stato de nia politika kaj ekonomia situacio estas troveblaj en lia portalo www.pozitivnisvet.cz.

Granda spaco estis dediĉita al ebla vivo de homoj en grupaj aŭ kooperativaj komunumoj, kiuj estus sendependaj en produktado de nutraĵoj kaj energio.

Tian orientadon al memsufiĉeco propagandas sinjoro Petr Hradil, kiu prelegis en blanka vesto simila al tola vesto de rusaj muĵikoj.

Por la problemaro de klerigado estis starigitaj grupoj, kiuj devis diskuti pri konkretaj temoj. Tiuj estis post du horoj prezentitaj al ĉiuj aŭskultantoj. Rezulto estis ĝenerale konataj rekomendoj pri edukado de infanoj. Tiamaniere ne eblas direkti bezonatajn reformojn.


En la konferenco havis paroladon ankaŭ kelkaj artistoj, ekz. Táňa Fišerová.

Kiel mi persone vidas la rezultojn de la ĉi-jara Ĉeĥa Konferenco?

Mia vidpunkto estas forte kritika. La konferenco ne kapablis respondi la demandon *Kiavoje kaj kiamaniere*, sed plejparte ĝi daŭrigis nur kritikon de la nuna stato kiel en la antaŭaj du jaroj.

Estas videble, ke la homoj malkontentaj kun la stato de la socio komencas organiziĝi ĉirkaŭ aktivaj gvidantoj kaj kreas diversajn peticiojn kaj subskribajn kampanjojn kaj manifestaciojn. Mi mem estis kontaktita de tiaj iniciatintoj kaj longe mi diskutis kun ili. Ankaŭ ili prelegis en la konferenco kaj al iliaj proponoj estis dediĉita atento.

Bedaŭrinde temas pri homoj sen necesaj kvalitoj kaj spertoj. La prezentataj ŝanĝoj estas nematuraj, malfacile realigeblaj kaj apenaŭ akiros la voĉdonantojn. Plie aperas ankaŭ danĝeraj kaj riskaj eksperimentoj. Sen karismaj, kompetentaj kaj home maturaj homoj ĉekape tiaj aktivadoj ŝajnas al mi potenciale malmulte sukcesaj, se ili estas entute dezirindaj.




Kvankam iu povas senti nostalgion al iama kampula vivostilo, en la nuna tempo tia ekzistado estas akceptebla nur por malgranda nombro de entuziasmuloj, kiujn kontentigus tia fuĝo el la nuna mondo. Certagrade mi vidas en tio forkuron el la realo. Niajn nuntempajn problemojn necesas solvi, ne forkuri for de ili.

Tra la tuta konferenco estis senteblaj altaj moralaj motivoj kaj noblaj ideoj pri la spirita ekzistado. Sed tio per si mem ne sufiĉas. Kompetenton gvidi aliajn en ĝusta direkto mi bedaŭrinde ne vidis.

La konferenco emfazas la instruon de Jan Amos Komenio kaj liajn saĝajn konsilojn. Mi ne opinias, ke Ĉeĥa Konferenco disponas pri kunlaborantoj, kies saĝo kaj scioj superus la saĝon de la instruanto de la nacioj.

Sed kiam ni cerbumas, kial la ĉiam aktualaj konsiloj kaj instrukcioj de J. A. Komenio restis sen konsiderinda praktika eĥo dum 350 jaroj, ni devas konstati, ke mankas konkretaj paŝoj kondukantaj al la celo.

La socio funkcias simile kiel la trafiko. Sen enkonduko de ĝustaj reguloj kaj sen ties obeado sub minaco de sankcioj apenaŭ eblas vojaĝi rapide kaj sen akcidentoj.

En la socio same kiel en la tuta naturo validas leĝoj, kiujn necesas ekkoni kaj adapti vojojn tiamaniere, ke la homoj povu en la socio vivi, labori kaj kreski, por ke ili fariĝu veraj homoj. La homa dimensio ne baziĝas sur kvanto de posedataj materiaj objektoj, sed sur la dimensio de vivata humaneco. Por atingi la celon necesas ĝuste starigi vojojn kaj balustradojn, kiuj la realigon faciligos.

Docento Marek Preiss skizis, ke studado de homgrupoj, posedantaj iun el la ses virtoj kaj 24 avantaĝojn de la karaktero, pruvas, ke homoj klopodantaj kreski en virtoj kaj havantaj pli multajn karakter-avantaĝojn, atingas statistike pli bonajn rezultojn ankaŭ en lernado kaj eĉ en la praktika vivo en entreprenado kaj en dungiteco. Egoismo atingas malpli bonajn rezultojn.

En la Ĉeĥan Konferencon mi metis grandajn esperojn, sed nun ŝajnas al mi, ke ties celoj ne estos atingitaj. Domaĝe, la estaro de la konferenco ne havas kuraĝon nek emon al necesaj politikaj paŝoj. Aŭ ili estas tiom saĝaj, ke ili ne kredas pri la sukceso.

Jen miaj impresoj de la konferenco. Kaj kion nun?

## LA 64-A IKU

En Kopenhago okazos naŭ IKU-prelegoj:

Davide Asorti: *La Zamenhofa revo inter lingvistiko kaj religio*; Věra Barandovská: *Interlingvistika dialogo ĉe Otto Jespersen*; Eva Bojaĝieva: *Oksigeno, utila kaj danĝera por la homo*; Erik Hoeg: *La profunda ĉielo – kredo kaj scio 2500-jara*; Hidenori Kadoja: *La vikinga epoko, naciismo kaj historiografio*; Jacob Nordfalk: *Maŝintradukado*; Tsvi Sadan: *La 'reviviĝo de la hebrea sen mitoj*; José Antonio Vergara: *Aidoso*; Amri Wandel: *Astrobiologio kaj la 50-jara serĉado de ekstertera inteligenteco*.

*Laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA*

# Sabla Printempo 2011

La 6-a Sabla Printempo, okazinta inter la 1-a kaj 3-a de aprilo 2011 estis nekutima pro du ŝanĝoj – ĉi-foje ĝi okupiĝis ne nur pri novaĵoj en Esperanto kaj Interreto, sed precipe pri tradukista trejnado en turisma sfero. Krome la unuan fojon ĝi ne okazis rekte en Písek, tamen en ĝia distrikto, en la urbo Milevsko.



Trideko da partoprenantoj sekvis intensan tradukekzercadon kaj viglan diskutadon pri diversaj „nuksetoj“ sub gvido de Miroslav Malovec kaj Pavla Dvořáková kaj interesiĝantoj povis ĉe Vladimír Türk lerni, kiel Esperante dubli aŭ subtekstigi mallongajn filmojn.

Okazis ankaŭ komuna vizito de la migra ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ en la urba biblioteko, kaj trarigardo de la plej malnova sudbohemia monaĥeja areo, proponita al la UNESKO-listo (kaj por ekzerci la lingvon, kun sinsekva interpretado al Esperanto).

Kelkaj produktoj de la aranĝo jam aperis en Aktualaĵoj de la asocia retejo www.esperanto.cz (dublitaj filmetoj „Ankaŭ ĉeĥa polico devas ŝpari“, „Biciklovagoj tra Milevsko“ kaj „Kastelo Jindřichův Hradec“), aliaj aperos tie ĝis fino de junio (ĉiĉerona terminologia bildkvizo, listo de „falsaj amikoj“, lingva prelego de M. Malovec, prezento „Faŭno kaj saĝaĵoj“ kaj aliaj).

*-padv-*

# Migra ekspozicio

„Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ estos gastigata dum junio kaj julio en la Urba Biblioteko en Jindřichův Hradec (strato *U knihovny* 1173, www.knih-jh.cz/) kaj dum aŭgusto (4.8.-4.9.2011) en Elbregiona Muzeo (Polabské muzeum) en Poděbrady (www.polabskemuzeum.cz/, Palackého 68,). La inaŭguro tie okazos kun ĉeesto de partoprenantoj de la KELI-Kongreso la 3-an de aŭgusto je la 16:30. Ni elkore invitas vin al vizito!

# Otokar Březina kaj Esperanto

La 28-an de aprilo 2011 en Moravské Budějovice estis inaŭgurita ekspozicio *Otokar Březina kaj Esperanto*. La granda ĉeĥa poeto (propranome Václav Jebavý, 1868-1929), kiu vivis en la proksima urbo Jaroměřice nad Rokytnou, ne estis esperantisto, sed multaj liaj poemoj estis esperantigitaj de Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr. Dum lia vivo kaj kun lia konsento aperis eseo *La homaj aroj* (Zástupové) en traduko de Rudolf Fridrich (Progreso 1926, p. 2).

La sisteman tradukadon de la poemoj provokis Praga esperantistino devenanta el Jaroměřice Jaroslava Míčová (1921-1973), kiu volis omaĝi la centjariĝon de la poeto en 1968. La eldono ne sukcesis, sed la tradukoj restis en la muzeo.




Nun Viktor Dvořák kun sia edzino Libuše el Moravské Budějovice kaj Miroslav Malovec el Brno klopodas prepari eldonon de la tradukoj. Kroma produkto de la klopodoj estas la priskribata ekspozicio, kiu okazis en la kastelo de Moravské Budějovice, kie nun troviĝas muzeo de metioj.



La inaŭguron ĉeestis trideko da personoj, inter ili esperantistoj Viktor kaj Libuše Dvořák, Margit Turková kaj Miroslav Malovec. La inaŭguro estis dediĉita ne nur al Březina, sed ankaŭ al la lokaj historiistoj Jaroslav Palliardi (1861-1922, trovinto de prahistoria statueto nomata Venuso el Věstonice) kaj Emil Jenerál (1911-1997, kronikisto).

Prelegoj alternis kun kantoj, poste ĉiuj transiris en la ĉambron kun paneloj de la ekspozicio, kie estis preparita ankaŭ malgranda bankedo. Du interesaĵoj: kelkaj el la ĉeestantoj jam komencis lerni Esperanton en Skokovy kaj en la muzeo de metioj troviĝas ankaŭ ekspozicio pri loka presisto Viktor Dvořák, patro de „nia“ Viktor, kion malkaŝis lia edzino.

*-mm-*

# Fringoj 2011

En bela naturo proksime de la urbo Baugé en Francio, ĉ. 200 km de Parizo, situas kastelo Grésillon, kultur-centro de francaj esperantistoj. En ĝi ĉirkaŭ Pasko renkontiĝas esperantistoj infanaj kaj adoleskantaj, gvidataj de plenkreskuloj. La renkonto nomiĝas FRINGO, kio estas nomo de bela birdeto (latine *Fringilla*, ĉeĥe: *pěnkava*), kiun ni aŭdis en la apuda parko, kaj ĉi tie ĝi samtempe signifas **F**esta **R**enkontiĝo **IN**ternacia de **G**eknaboj. Celo estas ekkoni kulturon de aliaj nacioj.



*Katarina magias per ŝnuro*

Ĉi-jare nia grupo konsistis el tri knabinoj (du Katarinoj, unu Nikola), du knaboj (ambaŭ Johanoj) kaj du gvidantinoj (mi kaj Klára). Ĉar la buso el Parizo forveturis matene, ni venis al Parizo unu tagon pli frue kaj faris promenon tra la urbo, bedaŭrinde por Luvro ni ne havis sufiĉe da tempo. Ni promenis preskaŭ ĝis noktomezo, tamen matene ni ĝustatempe atendis ĉe la bushaltejo. Aliĝis al ni ankaŭ esperantistino Fran el Brazilo, helponta en la kuirejo. En la alveninta buso estis la ĉefa organizantino Elizabeth, ŝia helpanto Gérard kun francaj knaboj, grupo de infanoj el Italio kaj knaba grupo el Portugalio. Antaŭ tagmezo ni atingis la kastelon kaj tuj ricevis tagmanĝon.



*Kun Bruno el Portugalio*

Niaj tri lernantinoj loĝis kun tri italaj knabinoj, el kiuj unu (Eliza) estis muta kaj havis sian help-instruiston Ermannon, kiu komunikis kun ŝi per gestlingvo. Ilia lernejo venkis en konkurso pri la plej bela lerneja himno, kiun ili alportis tradukitan al Esperanto, la refrenon ni kantis ankaŭ itale, portugale, ĉeĥe, france kaj ruse. El du francaj knaboj Mickael estis nigrulo kaj Veliga venis al Francio kun sia patro, politika azilpetanto. Ili estas samaĝaj kun niaj du knaboj kaj loĝis kun ili en unu ĉambro, en kiu estis ofte tre tumulte.

Jam dimanĉe komenciĝis diversaj prezentadoj. Sceno pri esperantista Abdero, pantomimo pri muzikistoj, brazilaj kaj portugalaj kantoj, magiaj spektakloj. Ni jam hejme lernis fabelon „Pri ora fiŝo“, legendon pri la emblemo de nia urbo Česká Třebová kaj naciajn dancojn. Unu el niaj Katarinoj iomete lamis, mia helpantino Klara helpis, tamen ili dancis nur mallonge, tial la knaboj ne povis sufiĉe uzi siajn paskajn batilojn.

La sceno pri la urba emblemo tre plaĉis. La urba skribisto perdis la urban sigelilon kaj tial lin atendis ekzekuto. Lia edzino post banado de infano elverŝis la akvon en sterkejon kaj rimarkis, ke virkoko tie elfosis per piedoj la sigelilon, kio savis la vivon de la skribisto. Pro tio en la emblemo estas virkoko kun homa kapo. Ambaŭ niaj Johanĉjoj ludis du rolojn, unu senditon kaj policiston, la alia kriantan infanon kaj fosantan virkokon.

Mi ĝojis, ke niaj geknaboj partoprenis en ĉiuj aranĝoj, knabinoj en Abdero, knaboj en pantomimo, ĉiuj kantis, unu Katarina eĉ glutis glavojn, alia knabino sorĉis per ŝnuro, Johanĉjo per domeno, Nikola per skatoleto plena de feraĵoj. Plie ni ornamis spickukojn, promenis kaj ludis en la naturo aŭ en la saloneto aŭskultis rakontadon de Fran pri Brazilo. Ni vizitis ankaŭ dolmenon kaj antikvan apotekon en Baugé.



Post semajno ni malvolonte forlasis la kastelon. En Bondy nin atendis esperantistoj, kun kiuj ni bone babilis, sed kiam ili transportis nin 5 km al nia hotelo, ili perdis la vojon kaj trafis nur je la dua horo post noktomezo. Ni devis rezigni pri la matena promeno tra Parizo.

*Zdenka Novotná*

# Vizito en Fibertex plaĉis

Sabate la 30-an de aprilo 2011 Klubo de Amikoj de Esperanto en Svitavy organizis regionan renkontiĝon. Alvenis kvardeko da esperantistoj el 19 lokoj de la respubliko. Antaŭtagmeze la partoprenantoj vizitis novan danan entreprenon Fibertex en Svitavy, tra kiu nin gvidis kaj respondis ĉiujn scivolajn demandojn Ing. Stanislav Šustr. La firmo produktas neteksitajn tekstilaĵojn, uzatajn ĉe aŭtomobiloj, en domkonstruado, ĉe mebloj.




La firmo havas uzinojn en Malajzio kaj Sudafrika Respubliko kaj eksportas siajn produktojn al multaj landoj de la mondo. La fabriko en Svitavy estas aŭtomatigita kaj modernigita, kun minimuma manlaboro.

La posttagmeza programo sekvis en Esperanto-muzeo. Kvido Janík projekciis videon pri siaj vojaĝoj tra norda Eŭropo. Dum la programo venis la urbestro de Svitavy Mgr. David Šimek, kiu aŭspicios la aŭtunan internacian aranĝon Wikimanio, kaj ankaŭ loka kabla televido.

*Libuše Dvořáková*

# Hanušovice



La 14-an de majo 2011 EK Šumperk okazigis renkontiĝon en Hanušovice.



La ĉefa programo estis vizito de la lokaj bierfarejo Holba kaj bier-muzeo, posttagmeze babilado kaj informoj de kluboj.



Venis ĉ. 30 personoj, kiujn la bierfarejo kaj la muzeo entuziasmigis.



Ili informis pri la 63-a IFEF-kongreso en Liberec kaj pri agado de rondetoj en Česká Třebová, Přerov, Svitavy, Pardubice kaj ĉefe pri preparo de soleno en Olomouc – 100 jaroj de la klubo de la 10-a ĝis la 12-a de junio 2011. La renkontiĝon kronis riĉa tombolo.



Mallonga promenado tra la naturo finis amikan renkontiĝon.

Inter la gastoj estis Lazar Karakašev el Bulgario, kiu antaŭe ĉeestis la IFEF kongreson en Liberec.

*L. Láni, J. Křížková*
*Fotoj Karel Čada*

# Muzea nokto en Svitavy

*okazis sabate la 4-an de junio 2011 sub slogano **Kaj tamen turniĝas ne nur la Tero, sed ankaŭ gramofonoj kaj lavmaŝinoj**. Samtempe estis inaŭgurita nova ekspozicio **Spiritaj tradicioj de la mondo kaj Esperanto** en Esperanto-Muzeo. La programo ekde la 16-a horo prezentis prelegojn, filmetojn, viziton de la muzea deponejo, de la muzea ĝardeno kun fiŝoj, de Ottendorfer-domo kun mistera fantomo, tendarfajron kun kantoj.*




# AdE-KONSULTEJO JE DISPONO

Eĉ la plej sperta uzanto de ajna lingvo iam ekhezitas, eĉ en la gepatra lingvo, do certe ankaŭ en Esperanto. Ni do rememorigas ke la Akademio de Esperanto jam en 1999 starigis sekcion Konsultejo (kvankam ĝis 2007 ĝi nomiĝis „komisiono“). Ĉiu Esperanto-uzanto povas turni sin al la Konsultejo kun difinitaj lingvaj demandoj por ricevi konsilon aŭ rekomendon. Demandojn pri vortfarado (novaj nocioj, terminoj) la Konsultejo povas respondi relative rapide; komplikaj gramatikaj problemoj kutime postulas pli longan tempon. La respondoj ne estas decidoj de la Akademio de Esperanto, sed rekomendoj de la Konsultejo; tamen la Akademio esperas, ke utilas tiu ĉi rapida servo, pri kies manko oni ofte plendis.

Pli da informoj kaj la demandoformularon vi trovos ĉe www.akademio-de-esperanto.org/konsultejo,
aliajn demandojn pri AdE ĉe
www.akademio-de-esperanto.org

# Infana hejmo Bona Espero en Brazilo

Bona Espero estas komunumo kaj bienlernejo por malriĉaj infanoj, fondita (1957) kaj gvidata de esperantistoj. Ĝi protektas, edukas kaj instruas infanojn, kiuj ne havas familion aŭ spertis mizerajn vivkondiĉojn.

Ĝi jam funkcias pli ol duonjarcenton en la brazila subŝtato Gojaso, apud la urbo Alto Paraíso. Oni instruas portugale, tamen Esperanton uzas kiel internacian komunikilon.

# Esperanto en „Gaja Pensiulo“ en Prago

*Veselý senior* (Gaja Pensiulo) estas fondaĵo en Prago aŭspiciata de fama ĉeĥa aktorino Tereza Kostková, rigardu www.veselypensiul.cz . Ĝi donas ŝancon al pensiuloj aktive vivi ankaŭ post la pensiiĝo. La principo estas, ke ĉiu, kiu pretas senpage disponigi al la ceteraj pensiuloj siajn konojn, povas proponi tion kaj se ekestos interesiĝantoj, Gaja Pensiulo enprogramas tion, informas pri la propono kaj oni povas efektivigi tiun kurson aŭ aktivecon en ĝiaj ĉambroj. Tiel funkcias tie diversaj aktivecoj, kiel angla klubo, ekzercado de memoro, instruo de citroludado, instruado de komputiko kaj de uzado de poŝtelefonoj, juraj konsiloj, prelegoj pri diversaj temoj kaj multo alia.

Post kiam mi konatiĝis kun tiu principo, mem komencinte vizitadi la kurson pri ekzercado de memoro, mi proponis, ke mi pretas tie instrui Esperanton kiel unu el efikaj manieroj de la prevento kontraŭ Alzheimer-malsano (kion rekomendis psikiatro d-ro Max Kašparů en radia programo pri tiu malsano). Dum la unua monato aliĝis unu interesiĝantino, en la dua monato pluaj du – kaj en novembro 2010 ni komencis. Momente estas en la kurso 9 personoj, unu viro jam forfalis, dua viro teorie ankoraŭ restas, sed praktike ne partoprenadas, do fidele restis nur 7 virinoj, kiujn mi ŝerce nomas „mia Esperanto-haremo“. La plej junaj du estas 62-jaraj, la plej maljuna 85-jara, sed ĉiuj estas anime junaj, diligentaj kaj la rezultoj jam estas bone videblaj.

Ni ne restas nur en la ĉambro, sed mi jam faris kun kelkaj miaj studentinoj du ekskursojn, la unuan al Svitavy, kie ni vizitis la Esperanto-muzeon en la tempo de Esperanto-renkontiĝo. Kaj dum la dua ni vizitis la seminarion en Skokovy por ke ili konatiĝu kun la medio kaj aŭtune jam kuraĝu aliĝi.

Post la unuhora intervjuo kun mi en la radiostacio ČR2 la 21-an de marto aliĝis pluaj 5 personoj (1 viro kaj 4 virinoj). Kaj ni komencis eksperimenton jenan: La plej kuraĝa lernantino de mia kurso (75-jara, kiu krom la kurso de Esperanto studas komputikon ĉe la universitato de la 3-a aĝo) komencis instrui ilin dekomence, per kio ankaŭ ŝi gajnas - ja per instruado oni plej efike mem lernas.

Mi tre deziras al miaj kursanoj, ke ili kuraĝe eltenu ellerni Esperanton, por ke ĝi portu al ili same multe da ĝojo, kiel ĝi jam portis kaj ankoraŭ portas al mi.

Petro Chrdle

Bonŝancon al tiuj kuraĝaj pensiuloj!

# Esperanton li lernis por ekkoni la mondon

La semajna gazeto Sedmička, versio por la regiono de Jindřichův Hradec, publikigis artikolon pri esperantisto el Žirovnice **Milan Volavka** kaj liaj kontaktoj kun eksterlando per Esperanto.


Esperanto se naučil, aby poznal svět

Milan Volavka si dopisuje s přáteli z třiadevadesáti států světa. Jejich dorozumívacím jazykem je esperanto.

Miroslav Boček


La artikolon vi trovos ĉe la adreso:

**www.sedmicka.cz/jindrichuv-hradec/clanek?id=163940**

# Pozvánka na 13. Sjezd Českého esperantského svazu

Vážení přátelé,

dovolujeme si Vás pozvat na 13. sjezd ČES, který se bude konat **ve dnech 7.-9. října 2011** v **Šumperku.** Město Šumperk se rozkládá v malebném údolí řeky Desné, chráněné od severu masívem jesenických hřebenů. Město Šumperk je právem označován za „**Bránu Jeseníků**“, protože leží na křižovatce cest, které vedou k nejvýznamnějším horským výchozím základnám - Skřítku, Červeno-horskému sedlu, Ramzové a také k úpatí masivu Kralického Sněžníku.



Místem konání sjezdu bude Střední odborná škola na adrese Zemědělská 3. Ubytovaní budeme v přilehlém Domově mládeže na dvoulůžkových pokojích. Domov je vybaven výtahem a na každém patře je k dispozici malá kuchyňka. Ve stejné budově jsou i klubovny, kde se uskuteční část programu. Domov je propojen s jídelnou, kde máme zajištěno stravování od páteční večeře po nedělní oběd. Díky vstřícnosti vedení školy lze se zúčastnit, tedy objednat a zaplatit, i pouze části jednání. Vlastní plenární zasedání se uskuteční v blízké aule. Domov mládeže má vlastní parkoviště pro osobní automobily.



Součástí zemědělské školy je i krátká naučná stezka věnovaná místní přírodě, která za pěkného počasí láká k relaxaci i posezení uprostřed zeleně. Členitost Domova mládeže umožňuje prezentaci Libroserva po celou dobu sjezdu i místo pro nerušené poklábosení přátel nad šálkem kávy či čaje.



Letošní pravidelné podzimní setkání členů Českého esperantského svazu je **volebním sjezdem**, ze kterého vzejde **nový výbor svazu**. Vzhledem k tomu, že pět dlouholetých členů výboru již nekandiduje do nového výboru, jedná se o podstatnou obměnu sedmičlenného vedení svazu. Letošní volby proběhnou podle nového volebního řádu, jehož zásady přednesl předseda volební komise Petr Chrdle na loňské konferenci v Poděbradech. S novým volebním řádem budou sjezdu předloženy k diskuzi a schválení i **nové Stanovy ČES**, které jsou upraveny tak, aby vyhovovaly našim současným potřebám a právním normám. Volební právo je právo každého člena svazu. Ten, komu záleží na dalším směrování naší organizace, se nepochybně zúčastní a využije svého práva pro dobro a další rozvoj svazu.



Kromě vlastního sjezdového jednání je na programu i oblíbená procházka a seznámení s místem sjezdu jakož i bohatou činností místních esperantistů. Páteční večer je jako obvykle vyhrazen prezentacím účastníků světových kongresů a dalších mezinárodních esperantských setkání. Z domácích akcí jsme zařadili reportáž o pohnutých osudech pamětního kamene esperantistů v Kopřivnici a jeho záchraně tamějšími skauty v poslední chvíli. Nebude chybět ani prezentace, co nového je na internetu v esperantu. Sobotní večer plánujeme tradiční společenský večer s živou hudbou.



Účastníkům z řad absolventů korespondenčních kurzů nabídneme rozmlouvací kurzy, které jistě uvítají i členové, kteří nemají možnost pravidelně esperanto používat. Nedělní dopoledne pak věnujeme výměně zkušeností na poli spolupráce s ostatními organizacemi, státními institucemi, místní samosprávou, získávání nových zájemců a v neposlední řadě finančních prostředků na klubovou činnost.

Věříme, že i vy přispějete svojí účastí a náměty k úspěšnému průběhu sjezdu!



*Výbor ČES*

# Návrh nového volebního řádu

Výbor ČES na svém jednání 5.6.2011 ve Svitavách schválil návrh nového volebního řádu.

Ve srovnání s řádem, dle kterého se volilo na minulém sjezdu, je ten nový nejen zhruba 4x delší, ale především obsahově značně odlišný.

Schválená verze v základech vychází z přípravné verze, která byla projednána na loňské konferenci v Poděbradech. Přesto i od ní se výrazně liší jak rozsahem tak obsahově.

Jaké jsou hlavní změny a co si nový řád klade za cíl?

1. rozsah

Zůstal zachován princip volební komise, návrhů kandidátů a samozřejmě i samotné volby. Kvantitativní nárůst je způsoben především:

a) Dochází k přesnějším definicím jednotlivých fází voleb a k vymezení postupu a řešení možných situací od jednoduchého schválení kandidátky až po řešení situace, kdy se výbor či revizní komisi podaří zvolit až v dalších kolech či dokonce vůbec ne.

b) Bylo nutné popsat vícestupňový způsob voleb v případě, že se nepodaří zvolit žádnou z předložených kandidátek.

2. obsah

Návrh předložený na loňské konferenci v Poděbradech již zachycoval a zdůvodňoval nutnost změn pro příští volby.

Ze základních jmenujme zejména:

a) Volba jednotlivců bez předchozí domluvy na rozdělení funkcí přinášela komplikace, kdy výbor byl sice početně kompletní, ale o některou z funkcí bylo zájemců více, zatímco o jinou (vč. předsedy) se ze zvolených neucházel nikdo.

b) Někteří z nezvolených dokonce hnutí opouštěli a v konečném důsledku se obtížně hledalo i jen 7 kandidátů, což bohužel platí stále, protože funkce jsou dobrovolné a s řadou odpovědností, ale bez jakýchkoliv materiálních výhod.

Předložený návrh proto jako hlavní změnu přinášel posílení úlohy volební komise, která bude kandidáty vybírat již přímo na konkrétní funkci a následně vybere z jejího pohledu optimální variantu. Sjezd by pak volil jednotlivé kandidáty a zároveň věděl, jakou funkci mají zastávat.

